Rimarkoj koncerne la librotenadon

La tri ĉi-kunaj tabeloj, bilanco, spezokonto kaj buĝeto, ne sufiĉas laŭ mi por doni precizan vidon al nia financa situacio. Antaŭ nelonge, ni komencis uzi analizan librotenadon, kiu ebligas pli bone vidi, kiuj agadoj estas efektive profitodonaj, sed la donitaĵoj, kiujn ili provizas, ne estas tiel klaraj kiel oni deziras. Detala analizo de la situacio restas farinda, sed ni ne havas veran kasiston.

Nia analiza librotenado provizas, por 2014, jenajn rezultojn, ne kalkulante centimojn :

Kategorio	Nomo	elspezo	enspezo	profito
0	Kulturdomo (ĝeneralaj spezoj)	29 551	9 049	-20 502
1	Semajno 1 (11 – 17 majo, nuligita)	0	138	+138
2	Semajno 2 (29 junio – 6 julio, nuligita)	455	455	0
3	Semajno 3 (1 – 9 aŭg, sennacieca alternativa)	2 530	6 720	+4 190
4	Semajno 4 (9 – 17 aŭg, festa por infanoj)	3 332	8 881	+5 549
5	Printempas (26 aprilo – 3 majo, ekzamenoj)	7 454	11 466	+4 013
6	Interkant (8 – 11 majo, ĥoro)	1 573	2 527	+954
7	Aŭtune (24 oktobro – 3 novembro, familioj)	3 692	4 649	+957
8	Jarfina FESTego (30 decembro – 4 januaro)	0	834	+834
9	Ludonoj	5 677	21 045	+15 368
11	Ceteraj	12 990	0	-12 990
	TOTAL	**68 384**	**66 430**	**-1 954**

Tiujn ĉi malnetajn nombrojn oni rigardu prudente. Kelkaj sumoj ne aperas en la ĝusta jaro : ekzemple, inter la ĝeneralaj spezoj, troviĝas la pagoj kaj de asekuro 2014 kaj de asekuro 2015, pagita la 29an de decembro 2014. La stokvariadoj, interalie de libroj, ne bone enkalkuliĝas. La amortizoj ne aperas. Kaj verŝajne restas eraroj je kategoriado : por Aŭtune, oni devus havi profiton je – 3 755 € + 7 855 € = +4 100 €.

En januaro 2015, mi provis alispecan analizon de la situacio. Mi unue apartigis la fiksajn elspezojn, kiuj ne dependas de la okupado de la kastelo, kaj tiuj ĉi egalas **45 € tage**, nome:

15 €/t	amortizoj
10 €/t	asekuro
10 €/t	impostoj
4 €/t	honorarioj pro librotenado
6 €/t	abonoj (telefono…), kontroloj (fajro, tegmento…) diversaĵoj (bankaj kostoj, turismoficejo…).

La periodo, dum kiu la kastelo estas malplena, nome 220 tagoj en 2014, kostas do proksimume 10 000 €. Sed tion ĉi kompensas la ludonoj, kiuj, por 66 tagoj da okupado de la kastelo, profitdonas proksimume 13 000 € – 66 x 45 € = 10 000 €.

La profitojn de la staĝoj oni do povas uzi por la diversaj aĉetoj. La aĉetoj de libroj kaj memoraĵoj estis 1 997 € en 2014 (kaj la vendoj 1 570 €), sed al tio oni aldonu la stokvariadon je 2 904 €. Dum pluraj jaroj, ni erare taksis la stokon de libroj je ilia vendoprezo, ni progresive riparas tiun ĉi eraron, sed la valoro de la stoko de poŝtkartoj estas ankoraŭ tro alte taksita.

Nia analiza konto 0, pri ĝeneralaj spezoj, kunigas plurspecajn spezojn, kaj inter ili elspezojn kaj enspezojn de konsumeblaj varoj kaj salajroj ja ligitaj al difinita uzado de la kastelo, sed ekster la staĝsemajnoj. Mi kalkulis 2 800 € da tiaj elspezoj kontraŭ 3 700 € da tiaj enspezoj, – 45 € x 29 tagoj (laborsemajnfinoj, Komitato kaj Jarkunsido), kio restas proksimume en ekvilibro. Estas aĉetoj ne ligitaj kun difinita uzado de la kastelo: litoj, pordoj; en 2015: fenestroj de ĉambroj 22 kaj 23, fajro-alarmilo, herbo-tondilo… ; mi kalkulis ĉirkaŭ 3 000 € da tiaj elspezoj en 2014. Fine mi trovis iom pli ol 5 000 € pro aĉeto de servoj: honorario de nia advokatino (2 880 €), fakturoj pagitaj al societo Randstad provizanta provizorajn laboristojn, pro instalado fare de Frédéric Lauriol de la elektro de la nova ŝtuparo (2 113 €). Tiaj ĉi elspezoj verŝajne malkreskos en 2015.

Fronte al tiuj aĉetoj troviĝas la profitoj de la diversaj staĝosemajnoj. La analiza kompleta kontlibro aperigas esence (se oni deduktas 45 € tage pro fiksaj elspezoj):

4 190 € – 7 x 45 € = ĉirkaŭ 3 900 € por la semajno 3
5 549 € – 7 x 45 € = ĉirkaŭ 5 200 € por la semajno 4
4 013 € – 8 x 45 € = ĉirkaŭ 3 700 € por Printempas
4 100 € – 9 x 45 € = ĉirkaŭ 3 700 € por Aŭtune

La Jarfina FESTego estis ja tre malprofita, se oni enkalkulas la elspezojn pro hejtado interalie, sed la kontoj de tiu ĉi jarfino aperas en du sinsekvaj jaroj 2014 kaj 2015.

Gravas iniciati pli fajnan analizon de nia librotenado por scii, kion eblas investi ekzemple por la ligo kun urba kloako, la ĉambro por handikapuloj kaj la necesejoj por handikapuloj, la interna ŝtuparo al la dua etaĝo, la prizorgado de la tegmento, ktp… Ni enkalkulu, ke tiaj elspezoj aperos kiel nemoveblaĵoj amortizotaj en la spezokonto dum pluraj jaroj. Necesas do unue rigardi la disponeblan monon. La 24an de junio nia poŝtkonto enhavas : 10 225 €, nia poŝta ŝparkonto : 22 950 €, kaj nia ŝparkonto ĉe Banque Populaire Atlantique : 39 839 €. La disponebla mono kreskis interalie dank' al vendo de B-societaj partoj, kiu komenciĝis en 2015. Ni ĝis nun vendis 42 B-societajn partojn (8 400 €) al 10 societanoj. Tiujn ĉi oni ne enkalkulos en la spezokonto, ĉar temas pri kresko de la kapitalo, sed ili ebligas plani investojn.

François LO JACOMO